# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris 4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS tél 278 68 86

MARTO - APRILO 1974 Nº 9

K O N G R E S O de la P A R I Z A F E D E R A C I O

9 - 10-an de Marto 1 9 7 4-a

SALLE GERARD PHILIPE APUD LA URBODOMO DE

S A I N T E - G E N E V I E V E - D E S - B O I S (ESSONNE)

---

## L A S Ŝ A J K A J G R A V A J I N F O R M O J

1º)- Dimanĉon 10 MAR 74 okazos la ĜENERALA ASEMBLEO kiu komencos ekde 9.30 H.
Pro tio vi povos envagoniĝi je la 8.39 H. en la stacidomo "Austerlitz". La trajno alvenas je la 9.01 H. al Ste-Geneviève-des-Bois. Aŭtobuso transportos vin ĝis la kongresejo.

2º)_ Tuj post la ĝenerala asembleo okazos EKSTERORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO por aprobo de ŝanĝoj en niaj statutoj. Jen tiuj ŝanĝoj:

En la artikolo 1-a: ANSTATAŬ: "Par les mots "Région Parisienne", on entend ici les départements de la Seine, la Seine-et-Oise, la Seine-et-Marne et l'Oise."
NI ADOPTOS: "Par les mots "Région Parisienne", on entend les départements de Paris (75), de SEINE-ET-MARNE (77), des YVELINES (78), de l'ESSONNE (91), des HAUTS-DE-SEINE (92), de SEINE-SAINT-DENIS (93), du VAL-DE-MARNE (94), et du VAL-D'OISE (95)."

En la artikolo 2-a: ANSTATAŬ: "Le Siège Social de la Fédération est à Paris, 34 rue de Chabrol, (Xème Arrt)." NI ADOPTOS: "Le Siège Social de la Fédération est à Paris -75004 -4bis rue de la Cerisaie. Il peut être transféré en tout autre lieu du territoire de la Fédération sur simple décision du Conseil Fédéral."

3º)- Laŭ la statutoj rajtos voĉdoni nur la membroj abonantaj, bonfarantaj, donacantaj, dumvivaj.

Se vi ne ĉeestos la kongreson vi povos sendi: ĉu RAJTIGILON, ĉu VOĈDONILOJN; en tiu lasta kazo
- a)- metu la voĉdonilojn en blankan koverton sen iu ajn indiko.
- b)- fermu tiun koverton kaj metu ĝin en alian sur kiu vi skribos vian nomon.
- c)- sendu la tuton al: "Pariza Federacio" 4bis, rue de la Cerisaie-75004 PARIS antaŭ la 7-an de Marto 1974. (afranku per 0,50 F-poŝtmarko por akceli la alvenon)

4º)- Kiel lastjare vi devos voĉdoni por U.F.E. kaj por la Pariza Federacio.

V i d u d e t a l o j n ĉ e p a ĝ o 5 - 6-a d e t i u ĉ i b u l t e n o .

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

APPEL AUX RETARDATAIRES : Le prochain bulletin sera envoyé aux seuls membres ayant réglé l a c o t i s a t i o n 1 9 7 4 .

OKAZE DE LA KONGRESO en Ste-Geneviève-des-Bois la loka filatela grupo eldonos specialan m e m o r k a r t o n .

MANTES-LA-VILLE: Nia amiko Paul CHAMPS malfermas Eº-kurson -Sin turni al lia adreso: 3, rue Jean Jaouen 78200 Mantes-la-Ville.

EN RESTORACIO "Le Thènard" 19, rue du Sommerard 75005 Paris, je la 19.15 H. V E S P E RMANĜO (moderaj prezoj): vendredojn 1-an de marto kaj 5-an de aprilo.

BONA ILO por sin perfektigi en esperanto: "Falsaj amikoj en Esperanto" de R.BERNARD kaj A.RIBOT - prezo: 4,50 F. (4bis rue de la Cerisaie)

ANSTATAŬ LUNDE: ĉiuĵaŭde vespere 19.45 H. Esperanto-renkonto 19, place des Vosges Paris : ĉe "Ma Bourgogne" en la fama kvartalo "La Marĉo"!

ATENTU!...ATENTU!.. montru vian intereson al Esperanto kongresante aŭ voĉdonante (perkorespondo) l a 1 0 - a n d e m a r t o .

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

RONDVOJAĜO EN SVEDUJO de Jean GUILLAUME

Eble pro mia normanda deveno, la Skandinavaj landoj ĉiam forte altiris min kaj kiam Jan STRÖNNE petis min fari propagandan vojaĝon tra Svedujo, mi tuj jese respondis.

Kvankam mi jam iris tien dekfoje, ĉu por Esperanta manifestacio, ĉu por komercaj aŭ inĝenieraj aferoj, mi ĉiam trovas novajn interesaĵojn.

Tiun ĉi fojon la okazaĵoj estis pli multenombraj, ĉar mi veturis aŭtomobile. Dank'al tio, mi faris 4 600 kilometrojn en la lando, restadis en 30 urboj kaj pro la bonaj organizoj, mi povis fari 45 paroladetojn en diversaj medioj. Unue ĉe la esperantistaj kluboj, sed ankaŭ ĉe la lernejoj kaj, neatendite, ĉe la domoj por maljunuloj, ĉe la handikapuloj kaj en la kontraŭalkohola asocio, kompreneble kun la helpo de gesamideanoj.

La rekordo estis en Universitato antaŭ 300 gestudentoj, dank'al S-ro FARM.

Nun mi deziras doni kelkajn el miaj memoraĵoj kiuj plej forte impresis min.

Unue, la kulturaj aferoj estas mirindaj. Kiam oni vizitas la kulturajn domojn, oni estas frapita de la multenombraj aktivecoj. Oni povas lerni lingvojn, artojn, sciencojn, manlaborojn, kaj vespere oni povas vidi personojn de ĉiuj aĝoj, kiuj vizitas la kursojn. Mi havas la impreson, ke la Svedoj soifas je scipovo.

Plie, la bibliotekoj estas rimarkeblaj. Tie oni libere eniras, elektas mem librojn, eksidas en komforta seĝo, prenas notojn en silenta atmosfero. Ofte mi havis la okazon tie legi francajn aŭ anglajn taggazetojn, netroveblajn en vendejoj.

La fakto, ke nur 5 personoj rajtas krei kurson, ke ili pro tio ricevas subvencion kaj ĉambron, kaj la gvidanto salajron, kun la ebleco trinki kafon, estas, mi kredas, unika aranĝo en la mondo. Oni devas diri, ke por la kulturaj celoj estas konkurenco kaj stimulo inter la diversaj asocioj, ĉu laboristaj, ĉu oficistaj, ĉu religiaj, ĉu politikaj, ĉu kamparaj, ĉu instruistaj, ĉu antialkoholaj, ĉu sportaj. Ĉiuj havas specialajn sidejojn kie oni organizas ĉiuvespere kursojn, konferencojn, metilernadojn kaj oni eĉ povas interesiĝi en hobioj.

Por fini pri tiu punkto, mi deziras mencii la riĉecon de la muzeoj, la bone konservitajn mezepokajn kastelojn kaj fortresojn, la diversstilajn malnovajn preĝejojn, la pitoreskajn centjarajn konstruaĵojn en naturaj medioj, eĉ kun iom da miro mi vidis du grandegajn monumentojn desegnitajn de Picasso.

Nun mi iros al aliaj facetoj. Kun granda ĝuo mi vizitis diversajn fabrikejojn, kaj mi estis impresita de la bona organizo kaj efikeco. La laboristojŝajne laboras en komfortaj cirkonstancoj. Oni ne tro laborigas ilin, sen premoj. Ili havas tempon por trinki varman aŭ malvarman trinkaĵon, kelkafoje ili havas muzikon. Mi admiris modernajn oficejojn kun moveblaj ekranegoj, la seriozecon de la kontrollaboristoj, la dividon de la laboroj de la grandaj firmoj en diversaj malgrandaj urboj. Mi rimarkis, ke en la laborejoj oni respektas la regulojn de la sekureco. En bruemaj lokoj, la laboristoj devas uzi orelprotektilojn, kelkafoje okulvitrojn. La maŝinoj havas efikajn protektilojn.

Fine meritas gratulojn la urboj kiuj havas centran hejtadon kaj distribuas varman akvon al preskaŭ ĉiuj domoj. Tiel la ĝenerala polucio estas malpli granda.

Sekve, mi parolos pri sociaj aferoj, kiuj estas tre interesaj. Sano estas la unua grava punkto kaj la ŝtato havas specialan atenton por ĉiuj enloĝantoj. En firmoj kaj lernejoj ekzistas konstantaj kontroloj de kuracistoj, senkoste. Hejma kuracado kostas malmulte, ĉu por kuracisto, ĉu por medikamentoj. Rimarkinde estas, ke vendado de medikamentoj kaj alkoholaĵoj estas ŝtata monopolo kaj la nombro de tiaj vendejoj estas dekfoje malpli granda ol en Francujo, sed verŝajne sufiĉa.

Jen trafa ekzemplo de la propagando por saneco : En du urbetoj, mi havis la okazon vidi centojn da familioj kiuj laŭvice marŝis tra la stratoj, sur la trotuaroj dum la dimanĉa mateno. Mi pensis pri manifestacio. Post enketo mi lernis, ke estis nur higiena rekomendo de la lokaj aŭtoritatoj ke la tuta loĝantaro devus marŝi dum tiu dimanĉo ĉar marŝado estas benefica por la sano.

La domoj por maljunuloj estas multenombraj kaj komfortaj. Ili havas apartajn ĉambrojn kun ĉiu komforto, restoracion, spektaklojn, materialo por laboreti, ekzemple teksmaŝinoj sen motoroj kaj iloj por prilabori lignon.

En magazenoj mi rimarkis specialajn enirejojn por handikapuloj en veturiletoj, liftojn kaj necesejojn por ili. En restoracioj la gepatroj envenas kun infanoj en bebveturiloj. Handikapulo povas aĉeti je duonprezo bonan aŭtomobilon. La lernejoj estas senpagaj, kaj oni servas senpage bonan lunĉon. La pensioj de la laboristoj estas sufiĉe bonaj, sed principe oni laboras ĝis la 67a jaro.

(daŭrigota ĉe paĝo 4a)

# UNE JOURNEE A LA HOUSSAYE-en-BRIE

DIMANĈON 21-an de Aprilo 1974

-o-o- PROGRAMO -o-o-

9.30 - Alveno de la partoprenontoj
10.00 - Paroĥa Diservo en la preĝejo de la Houssaye
11.15 - Vizito de la priorejo, kapelo, parko, ....
12.20 - Tagmanĝo (prezo de la tagmanĝo: 12 Frj)
14.00 - Vizito de la abelujoj
15.00/16.30 Amika kunveno: diskutado, babilado, k.t.p....

---

MOYENS DE COMMUNICATION :

SNCF: Paris-Est-Banlieue: ligne de Coulommiers ou de La Ferté-Gaucher
Départ: 8.20 (prendre un billet "bon dimanche" A/R réduction
Arrivée à Marles-en-Brie à 9.07 (à 2 km du Prieuré - Si nous sommes avisés, une voiture ira à la gare pour les vojageurs)
- Le soir, retour, départs de Marles-en-Brie: 19.39 , 21.17 .

AUTOCARS: Départs près du Métro "Porte de Vincennes"
CARS DARCHE-GROS (ligne "Touquin"); départ: 8.45; 114, cours de Vincennes sur la grande avenue en face du Café-Tabacs Laporte
CARS BIZIERE (ligne "Amillis") départ: 9.15; 104, cours de Vincennes sur la petite avenue près du Café du Métro. Pour l'un ou l'autre car, la durée du voyage est d'environ une heure. Descendre place de l'Eglise à la Houssaye. Retour:16.55 et 18.50 .

---

Veuillez avoir la gentillesse d'annoncer votre participation directement à :

F-to MARMOU: Prieuré Saint-Martin
LA HOUSSAYE-EN-BRIE
(tel.:409-41.25)77610-FONTENAY-TRESIGNY

a v a n t l e
1 7 A V R I L .

(Affranchissez votre lettre en service rapide : 0.50 Fr)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## ONDOJ - ESPERANTO SUR ONDOJ - ESPERANTO

La 3-an de januaro "France-Culture" elsendis intervjuon de S-ro SAUDIAN-ROUSSEAU pri ESPERANTO.

La 8-an de la sama monato, la franca radio, el la serio "La horo de mistero" elsendis "Boule de Neige" (neĝ-bulo) de franca verkistino....Temis pri fraŭlino kiu petas helpon ĉe policejo, krontraŭ sia propra kaj stranga konduto....Spite tion ŝi estas bona knabino; la dommastrino ŝin estimas, lernigas al ŝi ESPERANTON kaj ambaŭ legas verkojn de Ŝekspiro en esperanton tradukitaj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## AGADO DE NIAJ FEDERANOJ

Esperanto estas la lingvo por ĉiuj kaj por ĉio. En nia federacio pluraj el niaj anoj agas en diversaj sferoj. Tie ili laboras en sia propra medio, por difinita celo kaj krome propagandas Esperanton.
Jam en nia bulteno vi legis ke nia S-ano H.Y.CHAISNOT aktiviĝas por enkonduki Esperanton en la medion de "Radio-Amatoroj".
Nun ni prezentas du pliajn agadojn .

## M O V A D O J E A N

La ĉefa celo de Movado J E A N estas formiĝo de la persono en perspektivo de homaro fratece unuigita kaj komunume organizita.Gia nomo konsistas el komencliteroj, kies signifo sekvas:

Juneco de spirito
Edukado de si mem
Ardeco al laboro
Nobleco de karaktero

La membroj de Movado J E A N restas tute liberaj koncerne siajn religiajn kaj sociajn opiniojn.

La Asocio J E A N estas favora al ESPERANTO; multaj el ĝiaj anoj estas esperantistoj. La Frateca Esperantista Movado, kreita en 1934, estas sekcio de Movado J E A N .

Se vi deziras pliajn informojn turnu vin al: F-ino Huguette PLANTIVEAU
27, rue Vaugelas 75015 PARIS
tel 533 09 68

(F-ino PLANTIVEAU estas konsilianino de la Pariza Federacio de U.F.E.)

.../

**A . N. V . E . P .** Action Naturiste Végétarienne Espérantiste Pacifique

CENTRES d' INTERÊT.

N = Considération de la Nature, de ses lois. Respect. Protection. Plein air. Santé par les méthodes et moyens naturels. Exercice.
V = Abstinence. Hygiène alimentaire naturelle. Nourriture physiologique Respect de la Vie. Protection des animaux. Culture biologique.
E = Espéranto et idéal de Zamenhof. Mutuelle compréhension directe, immédiate, facile, rapide. Rapprochement fraternel des peuples.
P = Perfectionnement et maîtrise de soi. Non-violence. Service civil.

Renseignements : Sro André GAILLARD 48, rue de la Glacière 75013 PARIS tél.: 707 43 26

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

RONDVOJAĜO EN SVEDUJO (daŭrigo)

Sed por tiuj gravaj avantaĝoj laŝtato bezonas monon kaj discipline oni dekalkulas la impoŝtojn de la salarioj. Demokrate la malaltaj salajroj pagas kvaronon de la ricevita mono, sed por altaj salajroj la impoŝtoj esras la duono de la salajro. Fakte, la plej alta monata enspezo estas 5 000 kronoj.

Nun, el turisma vidpunkto: mi revidas la grandegajn arbarojn kun la trankvilaj akvoj de la lagoj kaj serpentumaj riveretoj; la plej grandan ponton de Eŭropo kiu kondukas al la pitoreska insulo Oland mi admiris dank'al Sro KINDGREN. Mi revidas la du alkojn, kiuj manĝis parton de betrikolto de kamparano, la antikvajn ŝtonojn de tombejoj aranĝitajn en granda boatformo, kaj tombmontetojn, la fascinantan spektaklon de la blovanta vitroartisto.

Dank'al tio, eble por okupi la longan vintron, la Svedoj havas agrablajn okupojn, pentras, muzikas, brikolas objektojn el ceramiko, lignajn objektojn, teksaĵojn. Eĉ viroj faras lanajn tapiŝojn. Kia pacienco! Tio estas benefica por la beleco kaj komforto de la domoj.

Eble el sveda vidpunkto miaj rimarkoj ŝajnas banalaj, sed por iu kiu travojaĝis la kvin kontinentojn kaj pro tio faris multajn komparojn, la atmosfero estas ĉe la supro de la homa progreso. Jam plurfoje mi rimarkis ke en Francujo oni kopiis svedajn ideojn kaj konklude mi esperas, ke oni pli kaj pli uzos en la mondo la bonajn ekzemplojn de tiu lando.

En tiu favora grundo certe nia esperantista movado devas flori dank'al niaj dinamikaj gesamideanoj.

J.G.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Mi ne ŝatas longajn diskutojn pri laboro; mia tempo estas limigita, pro tio mi ŝatas nur la laboron mem.

L. PREBIL

---

## K A L E N D A R O

M A R T O - M A J O 1 9 7 4

MARTO

9-10 PARIZA FEDERACIA KONGRESO EN Ste-GENEVIEVE-des-BOIS (nepre tuj aliĝu)

16 Konsilia kunveno, ĉe Cerisaie, je la 14.45 H. (Iu ajn membro rajtas partopreni kiel observanto).

23-29 PRINTEMPA KULTURA SEMAJNO en Grésillon. JEFO invitas vin ĉiujn (aliĝu: Cerisaie)

APRILO

30mar/2apr NACIA KONGRESO DE U.F.E. en Saint-Etienne. (ĉu vi sendis vian aliĝilon?).

13 Estrara kunveno, je la 14.45 H., ĉe Cerisaie (ne publika)

21 DIMANĈO en LA HOUSSAYE-en-BRIE (vidu ĉe paĝo 3a) ......Bonaera resanigo!

MAJO

10-11 Kongreso de francaj katolikaj esperantistoj en ANGERS: petu informojn de Sro R. Despiney 43, quai de Champagne 94170 Le Perreux.

18 Estrara kunveno, je la 14.45 H., ĉe Cerisaie (ne publika).

19 Dimanĉon posttagmeze vizito de : "Musée de l' Ile-de-France" en kastelo de Sceaux.

O F T E R E L E G U L A K A L E N D A R O N!

PARIZA FEDERACIO - JARO 1973

1º)- MORALA RAPORTO - La 19an de majo 1973 estis elektita la nova estraro de la Pariza Federacio: Prezidanto: Sro Roger DESPINEY, vic-prezidantoj: Sroj Jean GUILLAUME kaj Jean-Pierre PERAY, Kasisto: Sro Jack ROUSSEAU, Sekretario: Sro Etienne GAUDRY. La aliaj konsilianoj estis: Sino AMARIGLIO, Finoj CLAUDE kaj PLANTIVEAU, Sorj BOURDEAUX, DELATTE, Dominique DESPINEY, DOURY, HENRY kaj THIERRY. Sro Daniel BENAZECH konsentis okupi la liberan lokon. En 1973 la membraro atingis 244 anojn. - La federacia kongreso okazis en "Foyer International d'Accueil de Paris" la 29an de aprilo kune kun la kongreso de la Normanda Federacio.

Kvar mortoj trafis nian federacion: Sro Raymond SCHWARTZ, profesoroj FRECHET kaj LAURAT, Fino ROOS. - Menciindaj estas la kunvenoj organizitaj de la Pariza Grupo kun la simpatia Tri-Reĝa-kuko kunveno kiu okazis lastfoje en ŝabrola sidejo, la luksemburga vespero, la jugoslavia vespero, la literatura kunveno memore al pluraj mortintaj geesperantistoj kun prelegetoj de SAT-anoj kaj UFE-anoj; fine la Zamenhofa Vespero kaj taglibro kun prezento de libroj de Raymond SCHWARTZ kaj Gaston Waringhien; -. Ankaŭ la tri grupoj de la pariza ĉirkaŭaĵo organizis diversajn demonstraciojn. Ste Geneviève-des-Bois kun varietea kunveno en marto kaj, en oktobro, la vizito de la bela urbo Etampes. - . Le Perreux S/M kun partopreno en filatela ekspozicio kaj en la 1ª Festivalo "Arto & Kulturo", kaj en majo propaganda varietea kunveno. -. Rueil-Malmaison kun partopreno en kultura ekspozicio en decembro.

En januaro la ĝenerala konsilio de Val de Marne voĉdonis proponon favoran al enkonduko de Esperanto en la lernejojn. - Kvinfoje aperis la bulteno de la federacio, necesa ligo inter la esperantistoj de la pariza regiono.- .Ĉiu grupo malfermis kursojn kaj konversaciajn rondojn.

Pluraj federanoj ludis gravan rolon en la translokiĝo de la sidejo de UFE kaj la instalado de la nova domo, strato de la Cerisaie, kiu estis inaŭgurita en decembro.-. Finfine, plej-bonaĵo en tiu bela bukedo, estas la apero de "Esperanto sen peno" de nia amiko Jean Thierry.

Bone kaj diversmaniere agis la junulara esperantistaro de la federacio. -

RESUME: 1973 estis bona jaro kiu aŭguras bonan sekvon. Konklude: ke tiu konstato kuraĝigu ĉiujn kaj ke ĉiuj konsciu ke estas necese labori pli kaj plu.

Prezidanto: Roger Despiney

2º)- FINANCA RAPORTO (compte rendu financier)

| DEBIT | | CREDIT | |
|---|---|---|---|
| Edition du bulletin | 768,80 | Abonnement au bulletin | 4,00 |
| C.C.P. | 21.004,40 | C.C.P. | 17.562,35 |
| Virements internes | 559,50 | Virements internes | 559,50 |
| Congrès fédéral 1973 | 661,60 | Congrès fédéral 1973 | 985,50 |
| | | Congrès fédéral 1974 | 70,00 |
| Cotisation fédérale 1973 | 25,00 | Cotisation fédérale 1973 | 799,00 |
| Cotisation fédérale 1974 | | Cotisation fédérale 1974 | 333,00 |
| Frais généraux | 261,65 | Dons | 119,00 |
| G.E.E. | 48,00 | G.E.E. | 48,00 |
| Gr. Esper. Paris | 370,00 | Gr. Esper. Paris | 400,00 |
| J.E.F.O. | 48,00 | J.E.F.O. | 48,00 |
| U.F.E. 1973 | 9.370,00 | U.F.E. 1973 | 9.499,00 |
| U.F.E. 1974 | 5.668,00 | U.F.E. 1974 | 5.852,00 |
| Propagande | 20,80 | Fonds Propres | 1.842,40 |
| | | Membres à Vie | 684,00 |
| | 38.805,75 | | 38.805,75 |

BILAN

| | | | |
|---|---|---|---|
| C.C.P. | 3.442,05 | Congrès 1973 | 55,00 |
| U.F.E. 1974 | 136,00 | U.F.E. 1974 | 320,00 |
| | | U.F.E. 1973 | 129,00 |
| | | Cotisation féder. 1974 | 333,00 |
| | | G.E.P. | 30,00 |
| | | Congrès 1974 | 70,00 |
| | | Fonds Propres | 1.958,05 |
| | | Membres à Vie | 684,00 |
| | 3.578,05 | | 3.578,05 |

Le Trésorier: Jack Rousseau

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

FEDERACIA KONGRESO : La materialo necesa por voĉdoni troviĝas sur suplementa folio.
Nur tiuj, kiuj rajtas voĉdoni, ricevas ĝin.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

S-ro SAUDIAN-ROUSSEAU ricevis la jenan leteron, kiun ni plezure prezentas al niaj legantoj.

J. Villard
le Maine-Santy
16380 Souffrignac

la 7-an de novembro 1973

Kara Sinjoro,

Mi dankas vin pro via demando, kaj provos respondi kiel eble plej klare. Kiam mi lernis nian lingvon en Limoges, tuj post la unua mondmilito, naskis en mia cerbo iom strangan ideon. Mi pensis ke estus bone krei internacian vilaĝon kies loĝantoj apartenus al ĉiuj nacioj de l'mondo, nur unu familio per nacio, tia maniere ke oni ne povu uzi la nacian lingvon. Do, la loĝantoj devige devis uzi la internacian lingvon kiu estas komuna lingvo de tiu stranga nacio.

Iom stanga kaj ridinda ideo kiun mi nutris dum mia tuta vivo!.. Antaŭ tri jaroj, estante libera de la familia vivo, mi pruntis monon por aĉeti malnovan domon en tre agrabla vilaĝo, kun tri hektaroj da bona grundo en kiu mi provas fari belan parkon.

Estante sola, maljuna eksoficisto (80 jara) naturamiko kaj vegetarano, mi vivas modeste kaj sparas mian pensionon, pensante ke mi povos helpi la mizerulojn se ili estas samtempe saĝuloj.

Aliflanke, mi konstatis ke multaj urbanoj ŝatas libertempi en la pura aero de niaj vilaĝoj, kaj kelkefoje loĝi konstante post emerituleco. Pro tio en malgranda artikoleto en "Heroldo" mi proponis oferi senpage terenon por konstrui domojn por maljunuloj (emerituloj) kaj iom post iom krei la revatan, esperantan vilaĝon.

Mi posedas pli ol cent leterojn, venante el ĉiuj anguloj de la mondo kiuj entuziasmiĝas pri la ideo, bedaŭrinde, neniu havas la necesan monon por konstrui la deziratan vilaĝon.

Tamen, mi ne malkuraĝas, kaj daŭrigas labori, verŝajne, iuj profitos mian laboron. En mia propra domo, mi konstruis belan ĉambron, por gastigi dece la vizitantojn, apud, mi konstruis sufiĉe grandan lokon en kiu estas kuirejo, dormejo kaj manĝsalono en kiu povos manĝi sen ĝene pli ol 50 personoj. Estas tiu loko ke mi nomas la Esperanta gastejo. Inter tiu loko kaj la parko troviĝas granda konstruaĵo kiun mi intencas fari lignlaborejon sed en ĝi oni povus fari festsalonon, kinejon aŭ teatron; en ĝi povus ĉeesti pli ol du mil personoj. Venontjare, mi planas konstrui du novajn domojn en la parko. Mia penso estas vendi tiujn domojn al esperanta familio kaj per la mono konstrui grandan domon por nia revuo "Heroldo". Tiel komencos la Zamenhofa vilaĝo.

Kompreneble, tio povos sukcesi, nur se mi ricevas seriozajn helpantojn. Ĉi tiu jaro mi gastigis multajn vizitantojn, el Japanio, Norvegio, Usono, Anglio k.t.p. Ĉiuj entuziasmiĝis pri la beleco de la loko kaj multaj revenos. Pli multe ankaŭ sin anoncis por la venonta jaro sed tio kiu mankas por la sukceso kaj allogi la libertempulojn estas taŭga virino kiu kapablus kaj konsentus mastrumi en la "Esperanta gastejo". Ŝi povus loĝi en la bela ĉambro kaj nenion timi pri la manĝaĵo kaj vestaĵo. Bedaŭrinde la virinperloj kiuj necesus por la sukceso de nia afero ne abundas en nia malfeliĉa mondo eĉ en esperantujo.

Jen la demanditajn informojn pri tiu afero, se vi konsideras ke estas utopio, forĵetu mian leteron en la paperkorbon kaj forgesu min, kaj mi sole se estas necese daŭrigos mian laboron.

.................................. J.V.

-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-=0=-

ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo de Gresillon
49150 B A U G E

KULTURAJ ARANĜOJ
1 9 7 4

de la 23-a de marto ĝis la 2-a de aprilo
SEMINARIO : Lingvo-pedagogio
Dum la Seminario, de 23-a ĝis la 29-a de marto :
D E K T R I A K U L T U R A S E M A J N O organizita de J.E.F.O.
Temo : " la junularo fronte al esperanto ".

de la 1-a ĝis la 21-a de julio : KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ.

de la 22-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto : INTERNACIAJ SEMAJNOJ
Temo : " la homo kaj la maŝino "

de la 12-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro : STUDSEMAJNOJ.

FRUE ALIĜU.